

**Albert Jacquart (1925 – 2013) fakulo pri genetiko, pri sciencoj ĝenerale, franco.**

### **Opinio pri justeco**

« La lingva diverseco estas bona ekzemplo. La diversaj kunvenoj bezonas komunan lingvon. Tia komuna lingvo devas esti organizata ne per disvastigo de iu ekzistanta lingvo, kiu povus aspekti simpla kaj facile alirebla. Adekvate estus ne enkonduki ĝeneralan uzadon de la angla devige kaj doni al Esperanto ĝian ŝancon, ĉar ĝi estis konceptita por tiu uzado ».

### **Opinio pri demokratio**

« Por ke ĉiuj ŝtatoj en Eŭropo estu egalaj dum la renkontiĝoj, nepras, ke la komuna lingvo ne estu lingvo de unu el tiuj popoloj, ke ĝi ne estus la franca nek la angla nek la pola. Se oni tiel pripensas, solvo alvenas nature : lingvo, kies uzo neniam estis deviga, kaj kiu ekzistas tamen : temas pri Esperanto ».

### **Opinio pri pedagogio**

Francoj lanĉis petskribon, kiu celas enkonduki Esperanton kiel ekzamentemon dum bakalaŭro. Ili petis al Jacquart subteni tiun petskribon. Jen lia respondo :

« Mi ricevas kvazaŭ honoron la proponon esti paptopatro de tiu petskribo, kiu favoras Esperanton. Mi deziras, ke la instruado de Esperanto fariĝu oficiala en multaj landoj. Iam venos la tago, kiam ĉiu homo kapablos paroli Esperanton kiel komunan ilon ».